

& Hermes kaj la lignohakisto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo tradukita de Leiva balado (Leivur Øssursson), disduiginte la versojn.>

(#Melodio:

<:29> (

/mi mimi reedodo doLa; dore miimimi mi; mildo dore redo doLa; dore mimi mi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La a)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 Faligis foje hakilon ; sian lignohakist'
; e2n la riveron, kaj post ; ĝi kun granda
trist'

(×: **Paŝu firme sur plank'**, ; ŝuojn
trivu ankaŭ, ; regu **dio**, ; kie **dancos**
ni sen mank'.)

'2 rigardis sur la bordo. ; Hermes dum
preterir' ; ekvidis lin, demandis: ; "Kial
la suspir'?"

'3 Kaj, kun kompato scii;ĝinte pri l'
afer', ; li orhakilon portis al ; li el la
river':

'4 "Ĉu estas via?" "Ho, ne" — ; estis la
respond'. ; Arĝenthakilon nun li ; levis
el sub ond':

'5 "Ĉu via?" "Ne." Li portis ; je la tria
foj' ; la lian. Tiun nia ; homo kun ega
ĝoj'

'6 rekonis, kaj la dion ; kore dankis li. ;
Donacis Hermes tiam ; al li ĉiujn tri.
.....

'7 Feliĉe la homo iris ; for, kaj ĉe l'
renkont' ; al la kunuloj gaja ; estis lia
rakont'

'8 pri l' incident' agrabla: ; La perdo de
hakil' ; fariĝis por li granda ; gajno kaj
util'.

'9 [Unu el] la kunuloj, avi;dega enviul',
; sopiris gajnon saman, ; tial sen
skrupul'

'10 li iris al la rivero, ; en ĝin ĵetis mem
; hakilon sian kaj la;mentis inter ĝem'.
.....

'11 Nu, ankaŭ lin ekvidis ; Hermes dum
preterir', ; kaj same lin demandis: ;
"Kial la suspir'?"

'12 Kaj same, kiam li sci;iĝis pri l' afer',
; li orhakilon portis al ; li el la river'!
.....

'13 "Ĉu via?" "Jes!" — avide ; kriis la
homaĉ'. ; Malaperis dio, hakilo, ; restis
la domaĝ'.